

Terminproponoj:

- 1) serio da trajnoj (ĝisnuna termino)
- 2) trajnserio
- 3) sinsekvo da samecaj trajnoj

Jen PIV-klarigo:

serio 1 Aro da objektoj, aferoj, el kiuj ĉiu estas tiel same simila aŭ rilata al la antaŭa, kiel al la sekvanta.

04183 Unu el ambaŭflanke de ŝtatlino sur limtransiraj fervojoj situantaj stacioj, sur kiu la fervojan ekspluatadon transprenas najbara fervoja entrepreno.

ĉeĥa	<i>výměnná stanice</i>	itala	<i>stazione di scambio</i>
dana	<i>overgangsstation</i>	pola	<i>stacja przekazania</i>
franca	<i>gare d'échange</i>	rumana	<i>stație pentru schimbarea modului de exploatare</i>
germana	<i>Betriebswechselfahnhof</i>	serba	<i>prelazna stanica</i>
hungara	<i>átmeneti határállomás</i>		

Terminproponoj:

- 1) stacio interŝanĝa (personalo / lokomotivo) (ĝisnuna termino)
- 2) stacio landlima ekspluatinterŝanĝa
- 3) stacio landlima trajntransprena

Komparo: 04193 = stacio landlima


08094 Aranĝoj kaj laboroj de ekspluat-fervojistoj en stacioj kaj sur eksterstaciaj liniosekcioj, cele al movo de veturiloj por formado, disigo kaj trafikado de trajnoj, por drezinveturoj kaj por priservado de aldonservaj staciopartoj.

ĉeĥa	<i>vlaková služba</i>	itala	<i>servizio dei treni</i>
dana	<i>logtjeneste</i>	pola	<i>drużyny pociągowe</i>
franca	<i>service des trains</i>	rumana	<i>serviciu de circulație</i>
germana	<i>Fahrdienst</i>	serba	<i>vozna služba</i>
hungara	<i>vonatforgalom</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino „deĵoro trajnkompana” kaj pluraj naciaj terminoj okulfrapas pro mistraduko. Trajnkompano estas nur eta parto de la difinita deĵoraro, kiu ankaŭ inkludas manovradon.

Terminproponoj:

- 1) deĵoro vetura
- 2) deĵoro veturiga
- 3) deĵoro veturilmova



La varma, bela kandela lumo
brilu tra feliĉaj festotagoj!
Pacon kaj sanon por vi ĉiuj
dum la nova jaro 2008
elkore deziras Heinz Hoffmann.

Terminara Kuriero

TeKu 132

Decembro 2007

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 261319 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

Nekrologoj



22-an de oktobro 2007 forpasis la serba fervojfaka inĝeniero **Ludoviko Sekereš** 80-jara aĝa. Kiel esperantisto ekde 1948 li okupis gravajn funkciojn en la movado, estis membro de Esperanto-instituto en *Beograd*, kaj de 1987 ĝis 1989 gvidanto de Fakprelega Komisiono en IFEF. Komune kun *Josip Zupanić* li redaktis dulingvan Fervojan Terminareton kaj tradukis la Internacian Konvencion pri fervoja vartransporto (*CIM*). Jam ek 1973 preskaŭ ĝis sia morto li grave kontribuis evoluigon de Terminara Komisiono / Sekcio. Liaj detalegaj terminaraj kontribuoj ampleksis kutime 3 – 8 paĝojn. Pluraj Esperanto-organizaĵoj honoris lin.



17-an de novembro 2007, post longdaŭra kaj pacience suferata malsano, forpasis en sia 82-a vivojaro la aŭstra diplomita inĝeniero **Friedrich Tschom**. Kiel Direkcia Konsilisto ĉe Aŭstria Federacia Fervojo li dum jardekoj ankaŭ estis estro de Fervojista Esperanto-Asocio en *Linz*, kaj partoprenis kiel reprezentanto de Aŭstrio multnombrajn kongresojn en tuta Eŭropo. Multajn jarojn li gvidis Esperanto-kursojn. Li verkis fakprelegojn pri fervojaj instalaĵoj, kaj tiam longe kiel sia sanŝtato permesis, tre aktive kunlaboris en Terminara Komisiono / Sekcio de IFEF.

La forpaso de *Ludoviko Sekereš* kaj *Friedrich Tschom* signifas grandan perdon por la nacia kaj internacia Esperanto-movado. Neforgesataj ili ripozu en paco.



Alvenintaj kontribuoj

a) pri la taskoj en TeKu 131 sur paĝoj 3/4

Kolego *Per Engen* preferas ĉe ĉiuj traktitaj nocioj la solvon laŭ la unua aŭ unusola terminpropono, nome:

05003	substitua funkciigo	08982	trafiko grandrapida
05004	prokrasta funkciigo	09012	trafiko grandrapida kun restriktioj
08214	signal-sekuriga sistemo		

Kolego *Zdeněk Polák* esprimis la saman opinion koncerne la nociojn 05003 kaj 08244.

b) pri la problemo „termino / produktomo“ en TeKu 130 sur paĝoj 7/8

Kun d-ro *Zlatko Hinš* okazis vigla reta diskutado kun jenaj rezultoj:

■ Se konformas al celo de la teksto, povas esti oportune traduki nacilingvajn produktomojn. Tiuj tradukoj havu majusklaajn komencliterojn, diference de terminoj kun minuskloj. Jen du ekzemploj: La speciale por tuteŭropa fervoja uzo konceptita komandosistemo por ekspluatado *ERTMS (European Rail Traffic Management System)* estas tradukebla al „Eŭropa Fervojojtrafika Komandosistemo“. La samcele evoluigita datumtransigilo *Euroloop* konsistanta el pilotlineomaŝoj, estas tradukebla al „Eŭromaŝo“.

■ Povas okazi, ke *UIC* estonte enigis en sian datumbankon pliajn produktomojn, eventuale eĉ la supre menciitajn. Jam en la aktuala *RailLexic* troviĝas pluraj produktomoj anstataŭ terminoj. Ekzemplo estas la eksprestrajn-kategorio *ICE*. Ties Esperanto-versio tekstas:

sub „termino“: trajno *ICE*

sub „noto“: el angla *InterCity Express*

sub „difino“: Trajnkategorio de *DB* por granda rapido, konsistanta el *ICE*-tipa(j) motorvagonkombinaĵo(j) ekipita(j) per trifaza kurentotekniko, premrezistaj vagonkestoj kaj mikroprocesora trajnregado.

Tiukaze traduko de la angla produktomo ne estas rekomendinda, ĉar tiu nomo apenaŭ esprimas la verajn *ICE*-karakterizaĵojn. Fakte ja ĉiuj eksprestrajnoj trafikis inter pluraj urbocentroj.

■ Por sekvonta *PIV*-revizio estas pripensinde, ĉu proponi enigon de kelkaj neologismoj internacie vaste uzataj, kie ĝisnunaj Esperanto-solvoj ne kontentigas.

La produktomo *Eurocab* (enveturila registalaĵo) montras tipan ekzemplon: „kabino“. Sen tiu vorto estas malfacile nomi konstruciaĵon ĉe veturilo, telfero, gruo ktp, en kiu troviĝas malgranda ejo por unu aŭ kelkaj homoj. Prof. *Erich-Dieter Krause* jam enigis la vorton „kabino“ en sian novan vortaron Germana – Esperanto.

Allajn ekzemplojn montras la radiofonio-sistemo *GSM-R (Global System for Mobile Communication – Railway)*: „globala“ kaj „mobila“. Kvankam „globala“ estas evitebla per uzo de „tutmonda“, ekzistas opinioj favore al akcepto de la neologismo. La radiko „mobil-“ jam troviĝas en *PIV*, nome ĉe „mobilo“ (artaĵo el plaketoj, ekvilibre pendantaj de dratoj kaj turniĝantaj laŭ la aermovoj) kaj ĉe „mobilizi“ (peti helpon kaj batalpretigon ktp). „Mobila“ estas evitebla per uzo de „movebla“. Tamen „movebla“ havas en *PIV* tri signifojn: tia, ke oni povas (1) transigi objekton en alian

06641 Signalilpozicio ne plej restriktanta, indikanta veturpermeson.

ĉeĥa	<i>postavení návěstidla na návěst „Volno“</i>
dana	<i>„kør“-stilling</i>
franca	<i>position ouverte</i>
germana	<i>Fahrtstellung (eines Signals)</i>
hungara	<i>szabad állás (jelző)</i>
itala	<i>posizione di apertura</i>
pola	<i>położenie pozwalające na jazdę (sygnał)</i>
rumana	<i>indicație de circulație (semnal)</i>
serba	<i>signal u položaju dozvoljene vožnje</i>

Terminproponoj:

- 1) signalilpozicio malferma (ĝis nun: „signalilpozicio malfermita“)
- 2) signalilpozicio veturpermesa

08212 Signalilo kies pozicio indikas veturpermeson sen rapidolimo.

ĉeĥa	<i>návěstidlo v poloze „Volno“</i>	itala	<i>segnale disposto a via libera</i>
dana	<i>„kør“-tilfælde (signal)</i>	pola	<i>sygnał w pozycji</i>
franca	<i>signal à voie libre</i>		<i>zezwalającej na jazdę</i>
germana	<i>Signal uneingeschränkt auf Fahrt</i>	rumana	<i>semnal cu indicație permisivă</i>
hungara	<i>szabad állású (jelző)</i>	serba	<i>signal na pojmu „Vožnja“</i>

Dum ĉe 06632 / 06641 temas pri „pozicio de signalilo“, ĉi tie estas gramatika inversio „signalilo en pozicio“

Terminproponoj:

- 1) signalilo libere veturpozicia (ĝis nun: „signalilo liberpozicia“)
- 2) signalilo senrestrikte veturpozicia (rekomendinda ĉe solvo 2 de 06632)

08196 Signo markanta limon ĉe konverĝantaj trakoj, ĝis kie trako estas okupebla, sen malebligi veturojn sur la alia trako.

ĉeĥa	<i>návěst „Hranice depa“</i>	itala	<i>segnale limite di stazionamento</i>
dana	<i>rangergrænsemærke</i>	pola	<i>wskaznik ukresu</i>
franca	<i>signal de limite de garage</i>	rumana	<i>marca de siguranță</i>
germana	<i>Grenzzeichen</i>	serba	<i>međik</i>
hungara	<i>biztonsági határjel</i>		

Temas pri trakokonverĝoj ĉe trakforkoj kaj trakokrucaĵoj. En pluraj naciaj lingvoj estas evidenta mistraduko (signalplato manovrolimiga = 06010).

Terminproponoj:

- 1) limsigno trakokonverĝa (ĝis nun: „limsigno“)
- 2) signalajo trakuzeblolima



00795 Aro da trajnoj samdirektaj aŭ / kaj samrapidaj, kunigitaj en veturplano tiel, ke ili senpere sekvas unu la alian.

ĉeĥa	<i>svazek vlaků</i>	itala	<i>batteria di treni</i>
dana	<i>serie af tog</i>	pola	<i>pakiet pociągów</i>
franca	<i>batterie de trains</i>	rumana	<i>pachet de trenuri</i>
germana	<i>Zugbündel</i>	serba	<i>grupa (snob) vozova</i>
hungara	<i>vonatcsoport</i>		

lokon, (2) ŝanĝi la pozicion, (3) instigi, agigi. Ŝajnas sencodona, pripensi akcepton de „mobila” por la signifo (1), ekzemple ĉe „mobila radiofonio”.

La lastan ekzemplon montras la produktonomo *Eurobalise* (datumtransigilo / lokalizilo). Laŭ *Zlatko Hinšt* la vorto *balizo* estas nova termino en la kroata lingvo, prenita de la angla kaj franca *balise*. Verŝajne temas pri ĝeneralteknika nocio esprimanta ŝaltaranĝaĵon. Pensoj pri estonta PIV-enigo donos sencon nur, kiam klara difino estas trovita.

Mi dankas al la kontribuintoj.

Novaj taskoj

Al la sekvaj nocioj mi petas baldaŭ sendi viajn karajn opiniojn, por ke bonaj solvoj ankoraŭ povos eniri en la 4-an *RailLexic*-eldonon.

07015 Pasaĝerkajo kun nur unu kajobordero, situanta inter du trakoj, atingebla nur per samnivela transpaŝo de la antaŭa trako.

ĉeĥa	<i>nástupiště mezi kolejemi</i>	itala	<i>marciapiede intermedio</i>
dana	<i>mellemperron</i>	pola	<i>peron pośredni</i>
franca	<i>quai intermédiaire</i>	rumana	<i>rampă intermediară</i>
germana	<i>Zwischenbahnsteig</i>	serba	<i>peron između koloseka</i>
hungara	<i>közbenő peron</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino „kajo intera” ne sufiĉe komprenigas la nocion, ĉar ankaŭ insulkajo situas inter du trakoj. Ĉar kajo povas esti aŭ pasaĝerkajo aŭ kargadkajo, ni ankaŭ diskutu, ĉu en terminaro nomi pasaĝeran surirejon unuece „pasaĝerkajo” aŭ nur „kajo”. La suba listeto kun komparoj montras konfuzon.

Terminproponoj:

1) pasaĝerkajo intertraka unubordera

2) kajo traknivelpaŝe atingebla

Komparoj: 06995 = pasaĝerkajo	07013 = kajo alta
06999 = pasaĝerkajo malalta	07014 = insulkajo
07002 = kajo meza	07017 = pasaĝerkajo flanka
07006 = pasaĝerkajo tegmentita	07021 = kajo provizora
07010 = kajo subĉiela (pasaĝeroj)	



du pasaĝerkajoj
laŭ 07015

08139 Aparato kies optika aŭ akustika idiko ĝenerale koncernas moviĝon de fervojaj veturiloj.

ĉeĥa	<i>návěstidlo</i>	germana	<i>Signal(mittel)</i>	pola	<i>sygnał</i>
dana	<i>signal</i>	hungara	<i>jelző</i>	rumana	<i>semnal</i>
franca	<i>signal</i>	itala	<i>segnale</i>	serba	<i>signal</i>

La ĝisnuna Esperanto-termino „signalilo” estas gramatike ja ĝusta, tamen kontraŭas al la PIV-klarigo kaj al delonga praktika uzo, nomi „signalilo” sole lokfiksajn aparatojn por optike signali. Ilojn por akustika signalado (fajfilo, hupo, petardo, signalkorno, sonorilo) ni ne nomu „signaliloj”. Vidu ankaŭ la koncernan tekston en TeKu 128 sur paĝo 5. Jen ripete la PIV-klarigo:

signalilo Masto aŭ alia subportaĵo, ekipita per moveblaj brakoj (diskoj) kun lanternoj aŭ per diverskoloraj elektraĵoj por signali tage kaj nokte.

Terminproponoj:

1) signalaparato

2) signalrimedo

Jen tiuj PIV-klarigoj:

aparato Komplete aŭ mekanismo, aplikanta fizikan aŭ kemian fenomenon, por atingi specialan efikon.

rimedo Tio, kio servas por atingi celon.

06632 Signalilpozicio plej restriktanta, indikanta halton aŭ haltanoncon.

ĉeĥa	<i>návěstidlo v poloze přikazující snížit rychlost</i>
dana	<i>signal på „stop”; signal der viser „kør forsigtigt”</i>
franca	<i>position fermée (d'un signal)</i>
germana	<i>abgefallenes Signal</i>
hungara	<i>megállj állás</i>
itala	<i>posizione di via impedita (segnale); posizione di chiusura</i>
pola	<i>sygnał w pozycji „Stój”</i>
rumana	<i>semnal pe oprire; semnal cu indicația de avertizare</i>
serba	<i>signal u položaju „Opežno” (smanjenje brzine)</i>

Ĉi tie temas pri nocio, por kiu nur malmultaj naciaj faklingvoj havas specialan terminon. Ĝi inkludas kaj haltindikan pozicion (06628) de ĉefsignalilo kaj haltanoncan pozicion (04600) de antaŭsignalilo / ripeta signalilo. Dum neniu trajno veturas, la signaliloj havas ĝenerale ĉi tiun pozicion. La ĝisnuna Esperanto-termino „signalilpozicio fermita” laŭ la franca origino estas apenaŭ sufiĉe klare komprenebla.

Terminproponoj:

1) signalilpozicio ferma

2) signalilpozicio plej restriкта (laŭ nuna 08214: „signalilpozicio restriкта”)

3) signalilpozicio nevetura